# La SAGO
La Sat-Amikara GazetO
Mensuel - Numéro 49 - Novembre 2008






ESPERANTO

# PAU

64ª kongreso de SAT-Amikaro

Liceo Louis Barthou

11ª-14ª de Aprilo

# 2009

ESPERANTO









Photos Pierre Coudouy / www.coudouy.com

http://kongreso2009.sat-amikaro.org/

# Paŭo, per blazonoj...





Paŭo (nuna)

***«El lazuro kun barilo el tri pintaj palisoj el arĝento, surigita de pavo voste paradanta el oro, akompanata sube kaj interne de du vid-al-vidaj kronitaj bovinoj el la sama; kun kapo ankaŭ el oro ŝarĝita de testudŝelo el naturkoloro surigita de reĝa fermita krono el lazuro reliefigita el oro, akompanata dekstre de la majuskla litero H kaj live de la nombro kvar skribita en romaj ciferoj ankaŭ el lazuro.»***

Jen kiel Paŭlo Rajmondo *(Paul Raymond)* priskribas (tradukite) la blazonon de Paŭo .

Tiu blazono datumas nur de la 30a de Junio 1829. La antaŭan, pli simplan, donis la navara reĝo Francisko Febo (*François Phoebus*) en la jaro 1482 (eble en 1442).



Bearno

Tiun blazonon oni povas enmeti en la kategorion de la «parolantaj blazonoj», t.e. la blazonoj kiuj aludas al la nomoj de siaj posedantoj diversmaniere, ekzemple vortlude aŭ rebusmaniere. La Paŭa blazono konsistigas belan ekzemplon de tiaj blazonoj: la barilo, fakte palisaro, rekte rilatas al la etimologia signifo de Paŭo, kaj plie, aldoniĝas kvazaŭ ŝerce, la pavo, aŭde multe simila al Paŭo.

Diversaj legendoj provas klarigi tiun etimologion: antaŭ la 11a jarcento, ekzistis tie nur gvat-turo por regi vadejon, nura vojo por transiri Gavon, kiam oni alvenas el Pireneoj, ĉu oni estas pacema paŝtisto, ĉu invadema muzulmano. Kaj tiun turon ĉirkaŭis palisaro... kiu donis la nomon al Paŭo (ĉar en la okcitana lingvo «paliso» estas «pal» aŭ «pau»). Alia rakonto aludas al iu bearna princo, kiu tiam loĝis en Morlaso (*Morlaas*), ne plu eltenante la konstantajn invadojn de la Saracenoj, decidis konstrui fortikaĵon, kie li estos ŝirmita de tiuj invadoj. De la loĝantoj de la valo de Osaŭo (*Ossau*), li ricevis parton kontraŭ jura kontrakto. Oni starigis tri palisojn antaŭ la vadejo, kaj la kastelo konstruiĝis sur la loko de la meza paliso. Jen do por la pavo sur la meza paliso de l' blazono....

Sed ŝajnas ke Paŭo pli realisme ŝuldas sian nomon al pra-radiko «pal/bal» kiu signifas «kruta roko», kio ja spegulas la originalan lokon de la urbo; kaj ke Francisko Febo, reĝo de Navaro sed samtempe grafo de Fojso (*Foix*), havis blazonon, kiu konsistis precize el «tri palisoj el gorĝo» (ruĝaj), samkoloraj kiel sur la tiama donita blazono ...Ŝajnas do ke la legendoj konstruiĝis laŭ la nomo de Paŭo kaj ties blazono, kaj ne la malo....



Fojso

La «moderna blazono» celis alproprigi al Paŭo, la famon de la reĝo Henriko la 4a, kiu tie naskiĝis. Aldoniĝas sub la barilo la bovinoj, simboloj de Bearno, sed kun kronoj (ja oni ne aludu al Bearno, sed al ties reĝo!), kaj precipe aldoniĝas tuta blazonkapo, kun H majuskla (komenclitero de Henriko), kaj IV romcifera (formo de la orda numeralo 4a, laŭ la franca tradicio), kaj inter ili, la testudŝelo, legenda lulilo de la onta reĝo, surigita de krono preta rekte surigi la reĝan kapon... Kaj ĉio, kiel eble plej «el oro» (flava) kaj «el lazuro» (blua), kiuj estas la koloroj «de Francio»...



Paŭo (olda)

**Serĝo Sir'**

# Flore (kaj bearne) kuiru !

## La kuirpota kokino de Henriko la 4a

Preparado: 40 minutoj
Kuirado: 2 horoj kaj duono

**Por 6 personoj:**
1 senplumigita kaj sentripigita kokino
800 g da karotoj
300 g da napoj
4 poreoj, 1 cepo alpikita per du kariofiloj,
pipro, salo, kulero da timiano kaj hakita laŭrfolio

- Purigu ĉiujn legomojn kaj senŝeligu ilin.
- Metu la kokinon en grandan kuirpoton kaj subakvigu ĝin. Boligu kaj senŝaŭmigu.
- Aldonu la legomojn (faldu aŭ tranĉu duone la poreojn), la cepon alpikitan, la timianon kaj laŭrfolion, salu kaj pipru.
- Kovru kaj kuiru dum 2 horoj aŭ 2 horoj kaj duono.

La karno de la kokino devas facile disiĝi.

*Servu unue la sukon kaj poste la viandon kun la legomoj.*



## Bearna saŭco

Preparado: 20 minutoj
Kuirado: 10 minutoj

Por 6 personoj:
2 ovoflavoj; 5 kuleroj da blanka vino
3 kuleroj da vina vinagro
3 kuleroj da drakunkolo
1 cepo pecetigita; 150 g da butero; salo, pipro

- En poton, verŝu la blankan vinon, la vinagron, 2 kulerojn da drakunkolo, cepon, pipron kaj salon.
- Lasu la tuton kuiriĝi dum pli malpli 10 minutoj. Formetu el la varmofonto kaj atendu kelkajn minutojn. Aldonu la du ovoflavojn kaj ŝaŭmigu.
- Remetu ĉe la varmo kaj miksu senĉese ĝis ŝvelo de la saŭco.
- Poste eligu el la varmofonto kaj aldonu la buterpecetojn malvarmajn, bone miksu.

Plibonigu la saŭcon per la drakunkolo kaj aliaj spicoj laŭguste!

**Flora Markov**

## Bonvenon en

# PAU

*« Paŭo estas la plej bela detera vidaĵo,*
*kiel Napolo estas la plej bela demara ». Lamartino.*




**La OKK de la 64a kongreso ĝojas bonvenigi vin en la 64a francia departemento kaj aparte, en nia urbo Paŭo. Vi trovos, en la postaj paĝoj, informojn pri la urbo, la regiono kaj la unuajn elementojn de la kongresa programo. Vi konstatos, ke vi estos bone gastigita, centre de la urbo, rande de la *boulevard des Pyrénées*, en loko ebliganta ĉiujn eventojn de la kongreso (laboroj, prelegoj, gastigado). La programo, aparte kultura, arta, kaj turisma, estas riĉa. Ni esperas, ke ĝi logos vin por aliĝi senprokraste.**

### *Historieto de la urbo*

Paŭo estis fondita en la dua duono de la 11a jarcento, aŭ komenco de la 12a. Ĝi celis regi vadejojn tra la torento (fr *le gave*), kiun la ŝafgardistoj uzis por transirigi la ŝafan sezonan migradon.

La nomo de la urbo aperis en la 12a jarcento kaj la diversaj reĝoj de Bearno komencis evoluigi la urbon:

En 1464, Paŭo iĝas la ĉefurbo de la reĝoj de Navaro, refuĝintoj rande de la montaro Pireneo.

En 1553, La plej famkonata reĝo de Bearno naskiĝas. Li reĝos sub la nomo Henriko la 3-a de Navaro, kaj iĝos Henriko la 4-a, reĝo de Francio kaj de Navaro.

En 1620, Ludoviko la 13-a ligas la provincojn Bearno kaj Navaro al Francio, kaj la urbo akiras parlamenton: la «Parlamento de Navaro». Tamen, la urbo restas modesta kaj ŝuldas sian progreson al la nura termofonta turismo de la angloj kaj poste, al la eltrovo de la gasfonto en Lacq, en 1951.

De tiam, la urbo forte disvolviĝas kaj fariĝas la duaranga urbo en Akvitanio, post Bordozo.

## Identkarto

**Loĝantaro :**

- Paŭo : 83000 loĝantoj

- urbokomunaĵo : 140413 loĝantoj

**Urbodomo :**

Socialista, ekde 1971

La nuna urbestro estas

sinjorino ***Martine Lignère-Cassou***

### *Paŭo, verda urbo*
### *Paŭo, ĝardena urbo*

La centro de Paŭo disponas elstaran promenejon tra parkoj kaj ĝardenoj.

Palmoj kaj jukaoj sur pirenea fono. Firmiano platanfolia kaj lebanonaj kaj atlasaj cedroj, sekojoj gigantaj kaj ĉiam verdaj.

La tilioj de la ***Place Royale***. Japan-renesanca- meksik-stilaj ĝardenoj. Kaj floroj, floroj floroj... Bonfara Paŭa klimato.

Dank' al 750 hektaroj da verdaj publikaj spacoj kaj ĉiuj privataj ĝardenoj, Paŭo estis premiita je la rango "4 floroj" ekde 1983 kaj honorita de la Alta Nacia Premio pri urboflorado en 1990 kaj 1996.

Paŭo estas unu el la eŭropaj urboj posedantaj la plej grandan verdaĵan areon por ĉiu loĝanto (80m$^2$/loĝ.). De parko al parko, de floro al floro, venu frandi ferian mildon en la ĝardeno-urbon.

### *La kastelo de Paŭo*

Diversaspekta laŭ siaj fasadoj, la kastelo de Paŭo estas samtempe mezepoka fortreso, renesanca palaco kaj reĝa rezidejo.

Spite al kelkaj historiistaj disputoj, la kastelo estas konata, kiel naskiĝloko de Henriko la 4-a, la 13an de decembro 1553. Komence, ĝi estis fortika urbo de Gastono Febo. Ĝi poste disvolviĝis dank' al la laboroj ordonitaj, ĉefe de Henriko la 4-a, Napolenono la 1-a, Ludoviko-Filipo kaj Napoleono la 3-a.

Oni konas la kastelon de Paŭo pro



la testudo-karapaco, kiu iam estis uzata kiel lulilo de la reĝo Henriko la 4-a, kaj pro ĝia tablo, kiu povas akcepti 100 kunmanĝantojn. Plie, oni povas admiri multajn murtapiŝojn el la fabriko ***Gobelins.*** Vizito estos proponata en la kongresa tempo.

### *Paŭo, sporta urbo*

Sporto regas en Paŭo. Paŭo posedas unuagradan basket-klubon, fakte la mitan klubon de Orteso, duagradan

## Kiel atingi Paŭon ?

**Aŭtomobile :**

• Per la aŭtovojo A64:
**Marsejlo** (*Marseille*) *6h ;*
**Touluzo** (*Toulouse*) *2h.*

• Per la RN117:
**Bordozo** (*Bordeaux*) *3h ;*
**Nanto** (*Nantes*) *6h30.*

• De Hispanio :
**Barcelono** (*Barcelone*) *6h30;*
**Madrido** (*Madrid*) *7h30.*

**Trajne :**

• Per linio **Irun- Vintimiglia** *(Iruno-Vintimiljo) :*
**Tolono** (*Toulon*)
**Marsejlo** (*Marseille*)
**Touluzo** (*Toulouse*)
**Italio**

• Per linio **Coimbra-Irun** *(Koimbro-Iruno):*
**Portugalio kaj Hispanio**

• Per linio **Parizo-Tarbo** *(Paris-Tarbes):*
**Norda Francio** *Parizo-Paŭo = 5h30 per TGV (altrapida trajno).*

**Aviadile :**

*La flug-haveno de Paŭo estas malproksima. Vi devos uzi taksion aŭ informiĝi por amika veturado.*

Regulaj flugoj de Parizo, Amsterdamo, Ĉarlerojo *(Charleroy)*, Bristolo *(Bristol)* kaj Liono *(Lyon)*.

Korespondflugoj al multnombraj celoj tra Parizo.

## Paŭo : ĉu angla urbo ?

**La genezo de la Angla Epoko:**

Je la eko de la 19a jarcento la urbo gastigis la unuajn anglajn regnanojn. Nome, la soldatoj de la Velingtona Duko, kiuj invadis la sudan Francion.

Paŭo kaj ĝia milda klimato logis la armeon. Ekde tiam Paŭo famiĝas transmanike. Miloj da eksterlandanoj vintrumas en Paŭo.

**La britoj markas Paŭon per siaj spuroj:**

La fameco de la bearna urbo kreskas, des pli ke la skota doktoro Aleksandero Tajloro *(Alexander Taylor)* laŭdas la kuracan paŭan klimaton. Britaj riĉuloj kunportas sian vivstilon kaj iom post iom modeligas iujn kvartalojn britmaniere.

Venas ankaŭ usonanoj, brazilanoj, rusoj... Sed pli fortas en la urbo la spuro de la anglaj aristokratoj. Tiel aperas la unua kontinenta golfejo (1856), la anglikana preĝejo Sankta Andruo *(St Andrew)* kaj proksimume tri cent vilaoj en pompaj parkoj !

Je tiu epoko Paŭo estas la ĉefurbo de klimatoterapio, sporto kaj mondumaj festoj.



**La rojalistoj rezignas favore al la respublikanoj:**

Fine de la 19a jarcento, la britoj preferas restadi en Biarico *(Biarritz)* kaj ĉe la eŭska marbordo. Tiam la usonanoj anstataŭas ilin. Tiuj transatlantikaj anglosaksuloj trovas en Paŭo mondumaĵojn kaj diversspecajn distraĵojn: ĉevalvetkurojn, kriketon, poloon, golfludon, ĉasadon kaj baldaŭ la aŭtomobilan sporton. Sed en la aviadhistorio tiuj nordamerikanoj lasos sian spuron ...

**La fino de la anglosaksa ĉeesto:**

Kun la unua mondmilito ĉesos tiu favora periodo.

Paŭo konservas por ĉiam la spuron de tiu «angla» jarcento kaj oni povas plu admiri multajn vilaojn kaj parkojn, kiuj atestas pri tiu epoko...

## *Paŭo, aeronaŭtika urbo*

La unuaj balonflugoj okazas en Paŭo en 1844 kaj la unuaj flugoj per aviadilo, ekde 1909, kiam Vrajt-fratoj *(Wright)* malfermas la unuan tutmondan aviadlernejon en la mondo. Paŭo gastigas la nurajn sep tutmondajn aviadkonstruistojn ĝis 1914 kaj iĝas la tutmonda ĉefurbo de l' aviado. La milita aviadlernejo, kiu formas la spertulojn dum la Unua Mondmilito, kaj la franca lernejo de ĉasaviado tie establiĝas. Tie flugas la francoj *Thénault, Simon, Codos, Bellenger, Garros, Nungesser, Guynemer, Artigau* kaj *Macé* inter tiom da aliaj, kaj la usonanoj *Lufbery, Thaw, Chapman*, la fratoj *Prince, Mc Connell*, inter la plej famkonataj.

**Nuntempe, Paŭo apartenas al la tutmonda konkurenca poluso en la aeronaŭtika sektoro Aerospace Valley kun Tuluzo kaj Bordozo.** La aeronaŭtika industrio inkludas grandajn industriajn grupojn *(SAFRAN, Turboméca, Messier Dowty, Examéca, MAP...)*, kaj multnombrajn vicentreprenojn. Kun Biarico/ Bajono *(Dassault)* kaj Tarbezo *(EADS Socata, Tarmac)*, la Adour-regiono estas zono forte dediĉita al aeronaŭtiko (12 000 postenoj). Tiuj entreprenoj interagas en la programoj Airbus A380 / A300 / A330 / A320, Eurocopter, Boeing kaj Embraer. Paŭo gastigas ankaŭ la bontenan centron por la militaj helikopteroj Tigre. Aparte la flughavena zono *(Aéropole Pau-Pyrénées)* plene kreskas kaj grupigas aeronaŭtikajn kaj aŭtomobilajn vicentreprenojn.

En Paŭo, loĝas ankaŭ la 18 RI (infanteria regimento) la 1-a kaj 18-a RCP (ĉas-paraŝutista regimento). Ĉiuj partoprenis en diversaj konfliktoj en la 20a jarcento. La 18-a RCP estis malfondita en 1961 ĉar ĝi kontribuis al la puĉo de la Generaloj en Alĝero. La paraŝutista kazerno daŭre restas en Paŭo kaj rugbeo-klubon kaj futbal-klubon, kiu devus reatingi la trian gradon, fine de la jaro.

Plie, la urbo de nelonge posedas surakvan sportejon por kanuoj kaj kajakoj (Trejnejo de la Francia teamo) kaj sportejon ***(jaï-alaï)*** por la eŭska peloto.

### Partoprenis al tiu numero

Andreo Andrio; Bernard Cornevin; Fabrice Benoist; Flora Markov; Floreal Martorel; Fréderic Scibor; Ĵak Le Puil; Jean-Louis Carré; Henri Graven; Jean-Marc Leclerc; Joseph Moalic; Lionel Dupuy; Maksimiliano Gverino; Phil Guichet; Robert Lloancy; Robin Beto; Serĝo Sir'; Vinko Markovo

daŭre intervenas en konfliktoj, kiel ekzemple, en Afganio.


## Paŭo, grava centro de petrola kaj petrolokemia industrioj

***Nigra oro kaj flava gaso ...***

En 1951, oni malkovris en *Lacq*, apud Paŭo, unue nafton kaj poste gason. Tiu gaso enhavas altan elcentaĵon da sulfuro (15 %). Tiel la regiono de *Lacq* iĝas gasa regiono kun sulfurapartigaj uzinoj. La sulfuro, kiu unuatempe estis konsiderata kiel nedezirata, iĝis poste sufiĉe grava enspezfonto.

Paŭo spertis gravan ekonomian kreskon, bazitan sur la malkovro de tiu giganta tergasa kuŝejo. Tiu ĉi estis la tiama plej grava gasa kuŝejo surtera en Eŭropo. Ĝi ebligis al Francio ĝui memsufiĉecon pri gaso dum preskaŭ 30 jaroj. En *Lacq* naskiĝis la SNPA (ŝtata societo), kiu poste iĝis *Elf Aquitaine* kaj *Total*. Industriaj grupoj petrolaj kaj apudpetrolaj *(Total SA, Schlumberger, Halliburton)* kaj kemiaj *(Arkema, Air liquide)* estas lokitaj en Paŭo aŭ proksime (en *Lacq* kun la kemia parko *Chemparc*, en *Pardies* kaj en *Artix*).

La Paŭa Scienca Centro *TOTAL* estas la 1a esplorcentro pri gasaj kaj petrolaj esplorado kaj produktado en Eŭropo, nome preskaŭ 2 000 personoj, el kiuj 900 tersciencaj doktoroj kaj inĝenieroj. La terscienca esplorado ankaŭ baziĝas sur kunagadoj inter Universitato kaj entreprenoj. Ankaŭ notindas, ke la tersciencaj esplorado kaj inĝenieriado ĉeestas tra fakaj entreprenoj kaj fakaj trejncentroj.




La baseno ĉirkaŭ Lacq ankaŭ orientiĝis al fajna kemio *(Acetex, Celanese)* kaj al novaj materialoj. Iom post iom disvolviĝis en Bearno pintteknologio por la miksmaterialoj kaj nanomaterialoj kun la societo SOFICAR (kiu produktas karbonajn fibrojn) kaj la GRL (Esplorgrupo en *Lacq*), unu el la ĉefaj esplorcentroj de ARKEMA. Ankaŭ disvolviĝis investadoj rilate al energioj novaj kaj aliaj : la t.n. «biologiaj» agrokarburaĵoj, biomaso (celulozo) kaj la elektroproduktado el gaso (SNET). Simile disvolviĝas, ununura en la mondo, modela procezo por kapti kaj sekvestri $CO_2$ (injektado kaj stokado en elĉerpitan gasan kuŝejon).

Finfine, tiuj fajnkemiaj kaj fakkemiaj roloj, ebligos rekonverton de la gasprilaborado en la ĉirkaŭaĵo de Lacq.



# La liceo Louis Barthou

**Nia kongresejo origine estis jezuita mezlernejo konstruita instige de Ludoviko la 13-a, verŝajne inter 1622 kaj 1645, cele al la relokigo de katolikismo tiam superata de protestantismo.**

La liceo cedis al la urbo parton de sia parko. Tial, Paŭo posedas nun belegan ĝardenon kun vido al la Pireneoj: la parko *Beaumont*.

Vi povos do promeni laŭplaĉe dum la kongreso en la apuda ĉirkaŭaĵo, kiu konsistas el la urbocentro mem kun distraĵoj kaj butikoj, el la bulvardo Pyrénées kaj parko *Beaumont*, kiuj formas (kun la kastela bieno) grandegan vegetaĵan spacon por promenado.

Promenanto laŭiranta tiun bulvardon, longa je 1,8 km rande de klifo, povas spekti en la malproksimo la ĉenon de la montaro *Pyrénées* kaj la montopinton *Midi d'Ossau*, kaj preterpasi la Paŭan kablotramon.

Sur la apogmuro, noĉoj indikas (rigardante al la fulmoŝirmilo) la nomojn kaj altitudojn de tiu parto de la tieaj Pireneoj.

La liceo enhavas inter siaj ekslernantoj, multajn eminentulojn, kiel *Lautréamont, Saint-John Perse*, kaj kompreneble *Louis Barthou*, kaj ankaŭ nuntempajn famulojn kiel *Pierre Bourdieu, Henri Emmanuelli, Edouard Cissé, Daniel Balavoine*…

## *Kongresejo oportuna*

La liceo *Louis Barthou* disponigas por la kongreso alon de siaj konstruaĵoj. Tiel, en la sama loko kune troviĝas 5 laborsalonoj (24 ĝis 70 sidkokoj); la 200-sidloka kongresa salono, 130-ĉambra internulejo, kun 1- 2- aŭ 3-litaj dormĉambroj (Atentu : estas nur ŝtuparo, neniu lifto), kaj unu manĝejo.

Por iuj spektakloj, ni iros en la centron de la urbo en adekvataj salonoj.



La malnova parto de la Liceo



La konstruo 'I' kie okazos la kongreso



La trinkejo / Libroservo



La manĝejo

### *Apud Paŭo*

# Lescar

### *Historio*

Piede de la monteto, sur kiu etendiĝas la aktuala «Lescar» iam troviĝis la citadelo *(oppidum) Beneharnum*, ĉefurbo de la «Beneharnanoj». Tiu akvitania popolo donis sian nomon al la provinco Bearno. La citadelo iĝis romia urbo jam en la 3a jarcento. Beneharnum estis ĝistere detruata ĉirkaŭ 841 far la Vikingoj. Nova urbo, *Lescar*, disvolviĝas sur la monteto ekde la 12a jarcento. Ties episkopo prezidas la Bearnajn Ŝtatojn kaj la navaraj reĝoj elektas la katedralon kiel sepultejon.

Hodiaŭ, *Lescar* iĝis restadeja satelita urbo de Paŭo.

### *Kultura heredaĵo.*

### *La katedralo de Leskaro, dipatrina Katedralo.*

La konstruaĵon, komencitan en 1120 ruinigis protestantoj dum la reĝado de *Jeanne d'Albret* (Johanino la 3a de Navaro). Gravaj restaŭradoj, dum la 17a kaj 18a jarcentoj, savis la ĥorejon de ruiniĝo. La absido konservis romanikan arkitekturon. Sur la ĥoreja planko, mozaiko el la 12a jarcento bildigas ĉasan scenon (kun la fama kripla maŭra arkĉasisto). Henriko la 2a d'Albret, Katerina de Fojso, Margareta de Angulemo, Francisko Febo ĉi tie tombokuŝas.

## *Hoteloj*

Ĉar la kongresejo troviĝante centre de la urbo, facile eblos trovi hotelon je piedir-distanco. Ni menciu :

**La plej proksima, malmulte kosta:**

*Hotelo-trinkejo "le Matisse" **
17, Rue Mathieu Lalanne, 05 59 27 73

**Proksima kaj komforta :**

*Hotelo "Ibis"** Pau Centre*
26, Rue Samonzet, 05 59 83 71 83.

**Pli malproksima (5-minuta veturado) sed malmultkosta, kun facila parkumejo :**

*Hotelo "Montilleul"***
47 Avenuo J. Mermoz 05 59 62 37 46

# Kampo de Gurso

**La kampo de Gurso, proksime de Olorono-Sankta-Maria en Bearno, estas kampo por rifuĝintoj konstruita de la registaro de Edvardo Daladjero [*Edouard Daladier*] inter la 15a de marto kaj la 25a de aprilo 1939 por akcepti eksbatalantojn de la Hispana Intercivitana Milito post la venko de generalo Franko.**

Komence de la Dua Mondmilito, la sama registaro tie malliberigis eksterlandajn civitanojn el landoj militantaj kontraŭ Francio, kaj ankaŭ francajn aktivulojn de la komunista partio, kiuj favoris la germani-sovetian paktton.

Post la militpaŭzo de la 22a de junio 1940, subskribita inter Germanio kaj la franca registaro de Peteno (*Pétain*), ĝi estis uzita kiel koncentrejo por akcepti judojn de ĉiuj naciecoj - escepte de la franca - kaptitaj kaj deportitaj de la nazia registaro en la landoj de ĝi regataj.

Dum la milito, la kampo plie akceptis homojn, kiuj trairis kontraŭleĝe la landlimon de la zono okupaciita de la germanoj. Ĝi ankaŭ enkarcerigis hispanojn, kiuj jam antaŭe estis malliberigitaj en tiu ĉi kampo kaj, post liberiĝo dum aŭtuno 1940, vagadis en la regiono sen profesia pravigo. Kaj ĝi ankaŭ gastigis hispanojn el aliaj kampoj fermitaj pro la tieaj vivkondiĉoj aŭ pro la malalta nombro de malliberuloj, senpatrujulojn, ciganojn, komunjurajn malliberulojn atendantajn juĝon (prostituistoj, kaŝvendistoj, legitimil-falsistoj).

Post la liberigo de Francio kaj antaŭ ĝia porĉiama fermo en 1946, en ĝi estis mallonge detenitaj germanaj militkaptitoj, francaj kunlaborintoj kaj hispanaj batalintoj kiuj rezistis kontraŭ la germana okupacio, sed kies volo likvidi la faŝisman diktaturon de Franko iĝis danĝeraj por la Aliancanoj.

**Entute ĉirkaŭ 64 000 homoj estis malliberigitaj en Gurso, kaj 1 072 tie mortis.**

## La kampo

Post la venko de Franko kontraŭ la hispanaj respublikanoj en 1939, multaj batalintoj, kun tiuj, kiuj timis la frankismajn venĝojn, forfuĝis al Francio. La registaro de Edvardo Daladjero konstruis plurajn kampojn por akcepti la rifuĝintojn. Gurso estis la plej grava inter ili, instalita apud la samnoma urbo, en la Malsupra-Pirenea departemento (nunaj Atlantikaj-Pireneoj), 84 kilometrojn oriente de la atlantika oceano, kaj 34 kilometrojn norde de la hispana landlimo.

La kampo estis starigita sur longa monteto, kun ebena supro, argileca, kiu preskaŭ ne estis uzebla por loka terkulturado: maizokampoj kaj porbovaj erikejoj. La konstruado komenciĝis la 15an de marto 1939 kaj ankoraŭ ne estis finita kiam alvenis la unua grupo de rifuĝintoj, la 4an de aprilo.



## La vivkondiĉoj

La kampo estis 1400 metrojn longa kaj 200 metrojn larĝa, ĝi ampleksis 28 hektarojn. Nur unu strato trairis ĝin laŭlonge. Ambaŭflanke estis terpecoj 200 metrojn longaj kaj 100 metrojn larĝaj, nomitaj insuletoj, sep unuflanke kaj ses en la alia. La terpecoj estis disigitaj inter si kaj disde la strato de duoblaj muretoj, kies ekstera parto konsistigis vojon por la gardistoj.


Ĉiu terpeco entenis 30 barakojn, sume 382. Ĉi-tiu barakospeco estis elpensita de la francaj trupoj dum la unua mondmilito; instalitaj apud la fronto sed ŝirmitaj de la malamikaj pafaĵoj, ili estis loĝejoj por la soldatoj el la postfronto kiuj atendis por esti senditaj al la tranĉeo, kiun ili devos defendi. Ili estis el lignotabuloj kovritaj de akvoŝirma tolo kaj estis samgrandaj kaj samformataj. Neniu fenestro nek aerumtruo estis antaŭvidita. Ili ne ŝirmis kontraŭ la malvarmo kaj la akvoŝirma tolo tre rapide difektiĝis, kaj enlasis la pluvakvon. Ne estis mebloj kaj dormado okazis sur pajlosakoj kuŝantaj rekte sur la grundo. Kiam la kampo estis plej multe plenigita, en ĉiu barako loĝis ĝis 60 personoj.

**La nutraĵo estis malofta kaj malbonkvalita**; ne estis duŝejoj kaj akvokranoj. La higienaj kondiĉoj estis tre malbonaj. La kampo ne disponis drensistemon. Pro la proksimeco de la atlantika oceano, la grundo estis ofte akvumita de la pluvo, kiu faris la argilan terenon daŭre kota, escepte dum somero. La malliberuloj, per kelkaj trovitaj ŝtonetoj, provis pli-malpli ŝtonigi la vojon por solvi la problemon pri koto. Arbustoj sendornigitaj estis instalitaj por faciligi la vojon al la homoj inter la barakoj kaj la necesejoj.

En ĉiu insuleto estis bazaj lavaboj, similaj al bestotrinkujoj, sur du metrojn alta platformo, atingebla per ŝtuparo estis konstruita latrino. Sub la platformo, grandaj ujoj ricevis la fekaĵojn. Kiam plenplenaj, ili estis transportitaj per ĉaro ekster la kampo. La bariloj estis du metrojn altaj, ne elektrizitaj, kaj ne estis turoj kun gardistoj direktante maŝinpafilojn al la malliberuloj. La etoso estis draste malsama al tiu de la ekstermaj koncentrejoj kaj estis nek

ekzekutoj, nek sadismaj gardistoj.

Fuĝi el la kampo ne estis malfacile: la bariloj ne estis tre fortikaj kaj la kontrolado ne estis tre strikta. Sed la fuĝintoj, malbone vestitaj, sen mono nek scio pri la loka lingvo, estis rapide rekaptitaj kaj resenditaj al la kampo. Ĉe ilia reveno, ili estis enkarcerigitaj en la insuleto de la «ribeluloj». Kaze de rea forkuro, ili estis senditaj al alia kampo. Sed kiam ekstera helpo estis ebla, la fuĝo, en Hispanion aŭ en francan kaŝejon, povis sukcesi. Tiel estis por 755 fuĝintoj.




## La bonfaraj organizoj

Ekde la 20a de decembro 1940, diversaj helporganizoj rajtis interveni: aldone al la ekzilita eŭska registaro, sekcioj de la Svisa sukurservo instaliĝis en Gurso, kun francaj judaj organizoj tolerataj de la viŝia reĝimo kaj protestantaj organizoj kiel la Kvakeroj, CIMADE kaj YMCA. La kampo troviĝis en zono kie la loĝantoj estis plejmulte katolikaj, sed pro la ĉeesto de multaj respublikanaj batalintoj de la hispana milito kaj de multaj kontraŭklerikalaj komunistoj, neniu katolika organizo helpis la malliberulojn.

La 15an de februaro 1941 aldoniĝis la *Bonfara asocio por helpi al infanoj* (france: *Oeuvre de secours aux enfants*, juda organizo), kiu instalis kuracejon kaj ricevis de la viŝia registaro la permeson elirigi el Gurso multajn infanojn, kiujn ĝi loĝigis en diversaj akceptejoj tra tuta Francio.

## La malliberuloj

### El Hispanio

La rifuĝintoj el Hispanio estis dividitaj en kvar grupoj.

**Brigadanoj**: volontuloj aŭ solduloj, ĝenerale el centra eŭropo (Rusio, Germanio, Baltaj landoj, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, ktp) kiuj venis helpi la hispanajn respublikanojn kadre de la internaciaj brigadoj. Ili ne povis reiri al sia lando. Multaj sukcesis forfuĝi kaj la plimulto fine dungiĝis en la franca fremda legio. Inter ili estis 49 esperantistoj, kiuj fondis grupon kaj starigis 4 kursojn.

**Eŭskoj**: temis pri eŭskaj naciistoj, kiuj sukcesis foriri el ĉirkaŭita Santandero kaj, mare transportitaj ĝis la respublikana zono, daŭrigis la batalon el ekstere. Pro la proksimeco inter Gurso kaj ilia devenloko, ili preskaŭ ĉiuj sukcesis ricevi helpon, kiu ebligis al ili forlasi la koncentrejon, rifuĝante kaj laborante en Francio.

**Aviadistoj**: ili estis membroj de la tera laboristaro en la respublikana armeo. Kiel meĥanikistoj, estis al ili facile dungiĝi en francaj entreprenoj, kaj do forlasi la koncentrejon.

**Hispanoj**: ili estis terlaboristoj aŭ laboristoj el malpli bezonataj fakoj. Neniu en Francio interesiĝis pri ili. Ili konsistigis ŝarĝon por la franca registaro, kaj tio sufiĉis, interkonsente kun la frankisma registaro, por ilia resendo al Hispanio. Plej multaj el ili estis transdonitaj al la frankisma registaro en Iruno, kaj de tie estis senditaj al la koncentrejo de Mirando, kiel ili estis politike «normigitaj».

De 1939 ĝis aŭtuno 1940, la hispana lingvo ĉefis en la kampo. La malliberuloj kreis orĥestron kaj konstruis sportejon. La 14an de julio 1939, dum la franca nacia festo, la 17 000 hispandevenaj malliberuloj milite defilis sur la sporta tereno kantante *la Marseljezon*, kaj prezentis sportajn elmontrojn, voĉajn kaj instrumentajn muzikpecojn.

### El Francio

Komence de la dua mondmilito kaj poste dum la viŝia reĝimo la registaro de Edvardo Daladjero uzis la kampon por komunjuraj malliberuloj, por «nedeziratoj», kaj post la militpaŭzo de la 22a de junio 1940 por judaj familioj el zonoj okupitaj de Germanio.

Estis tien senditaj germanoj, kiuj loĝis en Francio, kia ajn estis ilia deveno aŭ politika tendenco, ĉar ili estis konsiderataj kiel fremdaj civitanoj de malamika nacio. Inter ili troviĝis sufiĉe multaj germanaj judoj kiuj ĝuste fuĝis pro la nazia reĝimo, kiel ekzemple Hannah Arendt, fuĝinta al Francio en 1933 kaj malliberigita en Gurso en majo 1940.

Ĉeestis francaj maldesktraj aktivuloj (sindikatistoj, socialistoj, anarĥiistoj kaj ĉefe komunistoj), kiujn la registaro taksis danĝeraj post la soveti-germana interkonsento. La unuaj alvenis la 21an de junio 1940 kaj la plimulto el ili estis resendita al aliaj koncentrejoj antaŭ la fino de la sama jaro.

Aldoniĝis pacistoj, kiuj rifuzis labori por la militindustrio, kaj ankaŭ francaj ekstremdekstruloj kiuj simpatiis al la germana armeo aŭ la nazia ideologio.

Post la militpaŭzo de la 22a de junio 1940 inter Francio kaj Germanio, Gurso troviĝis en la libera zono administrita de la viŝia reĝimo, kaj la koncentrejo do transiris al civila regado.

La milita koncentrejestro, nomita de la antaŭa registaro, forbruligis la arĥivojn kaj ebligis al la hispanaj respublikanoj forkuri kaj miksiĝi kun la franca loĝantaro. Tiu bruligo aliflanke malfaciligis iliajn postmilitajn klopodojn por ricevi kompenson pro la malliberigo. 700 el la malliberuloj, arestitaj pro nacieco aŭ pro simpatio al la nazia registaro, estis liberigitaj inter la 21a de aŭgusto, kiam alvenis en Gurso la esplorkomisiono sendita de la germana registaro, kaj oktobro.

### El Belgio

Ekde la 10a de majo 1940, 50 grupoj el plejparte judaj familioj estis tie deportitaj post la germana okupado de Belgio.

### El Nederlando

La unua grupo alvenis en Gurso la 21an de majo 1940, 11 tagojn post kiam la germana registaro ekis sian okcidentan kampanjon per invado de Nederlando.

El aliaj landoj okupitaj de la nazia registaro venis ankaŭ civitanoj el aliaj landoj en la influsfero de la nazia imperio, kiel Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Italio aŭ Pollando.

### El Germanio

Judaj germanoj estis tien deportitaj el Germanio post la 22a de junio 1940.

La plej malfacila momento estis oktobro 1940. La nazia regionestro de Badenio tiam ankaŭ iĝis samtempe estro de la apuda Alzaco. Estis tiam en Badenio ĉirkaŭ 7500 judoj, ĉefe virinoj, infanoj kaj maljunuloj, ĉar la junaj kaj mezaĝaj viroj jam forfuĝis el Germanio aŭ malaperis en naziaj koncentrejoj. Ĉar la regionestro eksciis, tra la viŝia registaro, pri la ekzisto de kampoj

# La Crise... une fois de plus !

***Le capitalisme est de nouveau en crise et montre ses atours peu flatteurs. L'injustice fait des ravages. C'est le moment de remettre sur la table le problème des relations internationales et de son vecteur : la langue. Désirons-nous passer de la domination à l'égalité ?***

Une fois de plus le capitalisme donne clairement à voir ses conséquences et ses mécanismes. Crise financière puis crise économique avec tentative de stabilisation de la situation par un apport de capital aux gros poissons et expéditions punitives de la police contre la population qui proteste. En ce moment, les lycéens sont en grève et sont aux prises avec les provocations policières et la prison ferme. La situation se tend.

Au niveau international, la situation se tend de la même manière, les «puissances occidentales» ou les «grandes puissances» telles qu'elles se nomment voient leurs pieds d'argile se ramollir au fur et à mesure de la montée de la marée-marasme. Il y a peu, lors d'un grand sommet international, un économiste a analysé la situation en posant le constat suivant : la situation que le monde connaît ressemble étrangement à une situation d'avant-guerre...

Il est donc temps de reposer la question des relations internationales : l'humanité acceptera-t-elle encore longtemps la domination de quelques Etats sur d'autres ? Continuerons-nous encore longtemps à accepter la domination d'une infime minorité de la population mondiale sur son immense majorité ?

Cette domination - dont l'outil est la guerre économique - passe aussi par la domination de la communication. Ainsi, le plus grand dominateur, les Etats-Unis, a imposé depuis la deuxième guerre mondiale l'anglais comme langue de communication internationale, se donnant ainsi un avantage énorme : pendant que 95% de la population mondiale tente désespérément - en investissant un temps et des sommes d'argent gigantesques - d'apprendre la langue de 5% de cette même population mondiale, les pays anglophones mettent à profit ce temps et cet argent pour développer leur domination économique. Ceci n'est pas le fait d'une évolution naturelle mais bien celui d'une politique bien comprise et systématiquement appliquée par les dominants et les gouvernements dont la volonté est de tout miser sur l'apprentissage de l'anglais à l'école. Les différents ministres de l'Education Nationale qui se sont succédés jusqu'à maintenant ont toujours refusé notre proposition d'un enseignement de l'Espéranto à l'école en argumentant que l'apprentissage d'une langue vaut pour la découverte d'une culture. L'Espéranto «n'ayant pas de culture», il ne serait pas concevable de l'enseigner. Or, peu à peu, par l'évolution des programmes scolaires, nous pouvons constater que la priorité, concernant l'enseignement des langues, devient l'apprentissage obligatoire de l'anglais, conçue comme langue de communication internationale... Sur quelles bases continuer donc à refuser l'enseignement de l'Espéranto ?




***Le rapport Grin*[1]**

En septembre 2005, un pavé dans la mare : le rapport Grin. François Grin, chercheur économiste de l'université de Genève, à la demande du Haut Conseil de l'Evaluation de l'Ecole (en France), livre un rapport intitulé «*L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*», dont l'objectif est «une analyse des enjeux sous l'angle de l'analyse de politiques : quelles langues étrangères enseigner, pour quelles raisons, et compte tenu de quel contexte ? (...) en s'appuyant principalement sur l'économie des langues et sur l'évaluation des politiques linguistiques.»

Grin propose comme hypothèse de travail trois scénarios d'enseignement des langues étrangères, dans le contexte actuel d'Union Européenne : le «tout-à-l'anglais» (où l'enseignement de langues étrangères se porterait uniquement sur l'anglais), le «plurilinguisme» (l'élève choisit d'apprendre deux ou trois langues) et le scénario «espéranto» (où l'élève apprend d'abord la langue internationale). Grin analyse ces scénarios sous l'angle d'efficience et d'équité.

**Selon le travail de François Grin, il ressort que :**

**1. le scénario «tout-à-l'anglais»** est le moins équitable en termes culturels et économiques,

**2. le scénario «plurilinguisme»** est plus équitable que le premier. Néanmoins, il est très coûteux et instable, car il peut laisser la voie ouverte à un glissement vers le «tout-à-l'anglais». De plus son efficacité est réduite : les probabilités pour un élève de rencontrer un autre parlant la même langue s'amenuise au fur et à mesure que s'agrandit l'UE, sans même prendre en considération le reste du monde.

**3. le scénario «espéranto»** est globalement aussi avantageux en termes de coûts mais est beaucoup plus équitable que le premier puisque l'espéranto a la particularité d'être simple d'accès et surtout de ne pas dépendre d'une puissance politique et économique. De plus, le scénario «espéranto» est beaucoup plus économique et efficient que le «plurilinguisme». D'autant plus qu'il n'empêche pas l'élève d'apprendre ensuite d'autres langues.

La politique d'enseignement des langues étrangères en France recommandée par François Grin est donc la suivante :

- à court et moyen termes, adopter le scénario «plurilinguisme», qui correspond le mieux à l'état d'esprit de nos contemporains en Union Européenne - en veillant à ce qu'il ne dérive pas vers le «tout-à-l'anglais» comme cela se fait actuellement,

- à long terme appliquer le scénario «espéranto», pour atteindre l'apprentissage généralisé de l'espéranto à l'école sur le temps d'une génération. Cette langue souffrant d'un rejet d'une grande part de la société, une telle transformation des mentalités ne peut se réaliser que sur une longue période.

Ce rapport est selon toute probabilité resté dans les tiroirs de ce Haut Conseil. Mais il n'en reste pas moins qu'il porte sur notre travail autour de l'espéranto une lumière nouvelle par des outils qui dépassent les convictions mais viennent aussi les confirmer : l'Espéranto est une solution de communication internationale juste et économique. Parce que c'est une langue où l'exception est absente, elle s'apprend aisément, et parce qu'elle n'est pas la langue de communication d'un peuple, elle appartient à tous.

La situation du système capitaliste telle que nous pouvons aujourd'hui l'observer nous encourage à retrousser nos manches pour réclamer et construire un autre type de relations mondiales : des relations égalitaires à l'aide de l'Espéranto.

1. Le rapport est consultable à cette adresse : http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf

# Kaj Tiel Plu

La formation Kaj Tiel Plu sera en concert lors de notre Congrès.

## Origines du groupe

En 1986, lors de l'IJF (Internacia Junulara Festivalo : festival international des jeunes espérantistes) de Castel-Veneto a eu lieu le premier concert du duo *Pep Tordera* et *Xavier Rodon*, forme embryonnaire du groupe actuel. Suivirent des apparitions diverses, principalement dans des manifestations de jeunes, en Hongrie, Pays Bas, Italie, France,... et naturellement en Catalogne. Entre temps le duo devint trio puis quatuor (avec *Josep M. Milla* et *Carles Vela*).

Les concerts qui suivirent le furent sous des noms divers: *Kordoj*, *Kataluna Kvaropo*, *Kaj Tiel Plu*. En 1989 le groupe édite «*Fajreroj*» (premier chansonnier catalan). En 1992 s'établit un long silence d'un an, correspondant au départ de Pep aux Etats-Unis. Le groupe se reforme dans le cadre du Congrès Universel d'espéranto de Montpellier en 1998, avec plusieurs concerts jusqu'à la récente édition de deux albums : «SOJLE DE LA KLARA TEMP'» en 2001 et «PLAĈAS AL MI» en 2004.

Actuellement en activité continue, le groupe se produit en concert ou en manifestation dansante dans des milieux espérantistes ou non-espérantistes, principalement catalans ou occitans.

## Répertoire

Leur répertoire se compose de chansons et de danses traditionelles, principalement occitanes et catalanes, mais en fait de partout et de tous temps (chansons du Moyen-Age, chansons Séfarades, chants de troubadours, chansons d'auteurs....) jouées selon leur propre style, à écouter ou à danser.

Les chansons sont interprétées dans leur langue originale : occitan, catalan, latin, castillan, tamazight... mais de préférence en espéranto devant un public espérantiste.

# Jacques Yvart

## *Le citoyen du monde en concert à Pau*

**«French troubadour» : c'est ainsi qu'on appelle Jacques Yvart aux USA où, après une vingtaine de tournées, après avoir assuré un cours intitulé «2000 ans de chanson française» dans deux universités réputées, après avoir - en passant - rempli Carnegie Hall, où - disais-je - il est peut-être plus connu qu'en France !**

De ce côté de l'Atlantique, on a souvent eu tendance à ne voir en lui que le "*chantre de la mer*". C'est faire peu de cas de la variété de ses chansons, souvent composées en collaboration avec des poètes qui n'avaient pas tous - loin s'en faut - l'humeur océane : voir Aragon, Barjavel... et d'avoir mis Norge en musique séduira Brassens qui enregistrera d'ailleurs Jehan l'Advenu.

Cinquante ans de chansons ! Sa première expérience de cabaret date, en effet, de l'été 58. Et puis, c'est le trio des Bab's, né en Algérie, durant le service militaire. Le groupe se taille de jolis succès dans la variété de qualité et enregistre six 45 tours.

Mais bientôt Yvart vole de ses propres ailes, collaborant notamment avec le poète dunkerquois André Devynck mais écrivant aussi ses propres textes, dont la réputation ne tarde pas à s'affirmer et qui parvient jusqu'aux oreilles de Brassens auprès duquel il fait les premières parties de plusieurs Bobino aujourd'hui entrés dans la légende.

"*Chantre de la mer*" ? L'océan (et ses marins) a longtemps constitué, il est vrai, un thème majeur d'inspiration pour Jacques Yvart, au point que quelques-unes de ses "marines" (Le Cabaret des Minteux, Le fils du Capitaine Achab , Ohé, ohé du bateau !) font maintenant partie de ces titres que les gens de mer recueillent épisodiquement dans leurs filets, enrichissant leur tradition au gré des couplets qui méritent de durer.

Un des albums qui ont marqué l'abondante discographie de Jacques Yvart s'intitule Citoyen du monde (1985) : il est emblématique de la démarche de l'artiste qui ne se contente pas de revendiquer cette



étiquette mais écrit bon nombre de chansons en s'y référant, allant même jusqu'à enregistrer plusieurs chansons en espéranto : c'est le cas de son récent CD : *Invito por vojaĝo* (2008), album d'adaptations superbes de chansons de Johnny Cash, Moustaki, d'Yvart, en passant par... Georges Brassens

Une présentation de Jacques Yvart, même succincte, se doit de mentionner son travail dans le domaine de la chanson pour enfants. Ses deux réalisations majeures, saluées par la critique et honorées par plusieurs Prix : L'Echelle Beaufort (1985) et Cache cachalot (1989) ne doivent d'ailleurs pas occulter les nombreuses chansons écrites avec des enfants même si, par nature, elles sont forcément confidentielles car réalisées dans le cadre d'ateliers scolaires.

Yvart, ouvert au monde, sait se mettre à son écoute, fût-ce celui de ceux communiquant difficilement (ou différemment) : témoin un CD produit en étroite collaboration avec les autistes de l'Association du Papotin (*Moi, j'aime Le Papotin*, 2005).

Ajoutons un mot de sa contribution à la réémergence des chants de marins traditionnels de sa Flandre natale : plusieurs disques avec le groupe Bootland.

Notons enfin que sa relation privilégiée avec Brassens a fini par convaincre Yvart de témoigner de leurs souvenirs communs : c'est l'objet de son dernier spectacle (disponible en DVD) : *Mon Brassens à moi, c'est toi*… Bien entendu, à ce "dernier spectacle", il convient d'ajouter "à ce jour" !

*Et vogue le bateau !*

**Joseph Moalic**

# Vignettes du congrès

Comme le veut la tradition, des autocollants (en couleur) pour faire la promotion du Congrès ont été édités.

Vous pouvez les commander au prix de 1,5€ les 10 auprès du libroservo de SAT-Amikaro ou de l'OKK du Congrès en même temps que votre inscription.






# Jules Verne espérantiste !

## *Une langue universelle pour une œuvre atemporelle…*

**Lionel Dupuy est enseignant d'histoire géographie. Auteur d'un mémoire sur Jules Verne il a rédigé de nombreux articles et ouvrages sur cet auteur.**

**Il prépare actuellement sa thèse sur le thème *Jules Verne, la géographie et l'imaginaire géographique*.**

**Il donnera une conférence lors du congrès.**

Nous avons célébré en 2005 le centenaire de la mort de l'un des auteurs les plus lus et les plus traduits au monde : Jules Verne (1828-1905). Si l'homme est mondialement connu, si ses romans ont été largement transposés au cinéma, combien de personnes peuvent cependant citer plus de 10 titres du romancier français ? Tel est l'étrange paradoxe qui couronne l'œuvre d'un homme qui a écrit pourtant plus de 80 romans et autres nouvelles…

Ce terrible constat tranche également avec la réalité que l'auteur a connue de son vivant. En 1894, Jules Verne déclarait ainsi avec peine au journaliste Robert Sherard : « Le grand regret de ma vie est que je n'ai jamais compté dans la littérature française. »

L'œuvre de Jules Verne est particulièrement complexe, multiple, polymorphe, inattendue et si souvent en avance sur son temps. Comment cerner effectivement cette œuvre aussi moderne, aussi éclairée, aussi innovante ? Dans quelle catégorie la ranger, comment l'aborder ? Faut-il d'ailleurs véritablement la ranger dans une catégorie bien précise… ? Non, assurément non. Car la richesse de cette œuvre réside bien évidemment dans son originalité et son atypicité.

Durant toute sa vie d'auteur, l'homme, témoin éclairé de son temps, curieux de tout, ouvert à toutes les formes nouvelles de progrès, a systématiquement intégré dans ses romans les dernières découvertes et révolutions réalisées par la science et la technique de son époque.

C'est donc tout naturellement qu'à la fin de sa vie le romancier s'intéresse à l'espéranto. Cette langue artificielle est ainsi au cœur des



quatre premiers chapitres de Voyage d'études (1903-1904), le dernier roman auquel travaillait l'auteur avant de mourir, le 24 mars 1905. Michel, le fils de Jules Verne, remaniera le texte par la suite pour le publier sous le titre de L'Étonnante aventure de la mission Barsac (1914). Or, dans cette nouvelle version, tous les passages relatifs à l'espéranto ont mystérieusement disparu…

Soixante-dix ans plus tard, en 1981, la ville de Nantes, où Jules Verne est né, procède à l'acquisition de nombreux inédits de l'auteur. C'est ainsi qu'est exhumé le manuscrit de Voyage d'études, dont la publication par la suite aux éditions du Cherche-Midi permet désormais de redonner à l'espéranto toute la place que la langue devait initialement occuper dans les pages écrites par Jules Verne.

Mais avant de nous lancer directement dans la présentation et l'analyse de ces chapitres redécouverts récemment, intéressons-nous d'abord à l'univers de Jules Verne et aux différentes influences qui ont marqué ses écrits. Ce petit voyage au centre de l'écriture, aux sources de l'inspiration vernienne, permettra de mieux comprendre comment et pourquoi Jules Verne s'est intéressé autant à l'espéranto, au point d'en faire l'élément central de son Voyage d'études…

**Lionel Dupuy**

### Renseignements Utiles

**Cours oraux au siège –** pour débutants:
**Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
**Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
**Cours par correspondance d'espéranto** :
*inscription directe auprès de :*
**C. Gerlat** 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 04 76 01 91 71 claude.gerlat@orange.fr
**Service Librairie** par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)
En France : au siège;
en Belgique chez Espéranto-Infor (adresses ci-dessous)
**Renseignements sur l'espéranto :**
FRANCE : SATamikaro
132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Espéranto-Infor, Rue du Loutrier, 14, BE-1170 Bruxelles. Tel. 02/6608591
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.
**Internet** : www.esperanto-sat.info

en la libera zono, kiuj povus akcepti ilin, li decidis deporti la badeniajn judojn al Gurso, lasante ilin sub franca administrado. La vivkondiĉoj estis tre malfacilaj dum la jaro, kiun ili pasigis en la koncentrejo, kaj pli ol mil el ili mortis, pro malsanoj, ĉefe tifo kaj disenterio.

Inter la alvenintoj, proksimume 700 sukcesis fuĝi al Hispanio por atingi Nordafrikon aŭ Usonon, kaj ĉirkaŭ 2000 fine ricevis vizojn, kiuj ebligis al ili laŭleĝe elmigri al aliaj landoj.

Inter tiuj, kiuj restis, pluraj miloj, la viroj en plej bona fizika stato, estis dungitaj en la francaj laborbatalionoj.

## Deportadoj al Oriento

Dum sia inspektado de la gursa kampo, la SS-estro Danekero [*Danecker*] decidis la 18an de julio 1942, ke la judoj estos senditaj al orienta Eŭropo. Inter la 6a de aŭgusto 1942 kaj la 3a de marto 1943, la 3907 judoj kiuj troviĝis en Gurso estis senditaj al la koncentrejo de Drancio (*Drancy*), apud Parizo, kaj de tie deportitaj en ses grupoj al Aŭŝvico, kie ili preskaŭ ĉiuj mortis.

## Fermo kaj rea malfermo de la kampo dum la Liberigo

La viŝia registaro fermis la kampon en novembro 1943. Dum la Liberigo, kiam la germana armeo forlasis la regionon, antaŭ la progreso de la aliancanoj en Francio, la novaj francaj respondeculoj malliberigis en Gurso akuzitojn pri kunlaboro kun la germanoj. Aldoniĝis hispanoj, kiuj batalis kun la francaj rezistantoj kaj intencis daŭrigi la militon sur franca-hispana fronto. Ĉar la franca registaro ne deziris konflikti kun Franko, ĉi tiuj hispanoj mallonge restadis en Gurso. Ankaŭ germanaj militkaptitoj estis tie.

## La malkonstruo

La kampo estis malkonstruita en 1946, kaj forgesiĝis. La monteto iom post iom kovriĝis per plantoj, kiuj ne ĉiam sukcesas sorbi la akvon fluantan el la argileca tero. Estas videblaj kelkaj el la ŝtonoj, kiuj konsistigis la vojojn kaj la bazojn de la barakoj, kaj kiujn foje dumsomere junuloj elfosas por atentigi pri la mizeraj vivkondiĉoj, kiujn entute spertis tie preskaŭ 64 000 personoj.

## La kampo de Gurso hodiaŭ

En la regiono kaj en la cetero de Francio, la nomo «*kampo de Gurso*» sonas kiel malbenita tomboŝtono sur monteto, pri kiu malmultaj homoj emas rememori. Eĉ la judaj organizoj restas sufokitaj pro siaj malabundaj klopodoj por savi la vivon de tiuj judoj malliberigitaj en Gurso, atendante foriron al amasmortejoj, dum la koncentrejo estis sub franca regado kaj kun iom da mono por subaĉeti la francajn gardistojn kaj la hispanajn ĝendarmojn de la proksimega landlimo, multaj judoj povus esti savitaj, forirante tra Hispanio kaj Portugalio al Nordafriko.

## La asocio kaj la Alvoko de Gurso

En 1979, junuloj el la regiono revivigis la memoron pri la forgesita koncentrejo, organizante prelegojn, kie ili invitis eksajn malliberigitojn. La movado ricevis ian eĥon en la franca, germana kaj hispana gazetaro; pro tio la postan jaron kuniĝis en Gurso la 20an kaj 21an de junio cento da eksmalliberuloj, el multaj landoj, kaj ankaŭ francaj rezistantoj aŭ postvivintoj el amasmortejoj, kaj ili kreis la Amikaron de Gurso. Ili verkis la alvokon de Gurso, kiun interalie diras: «*Gurso, simbolo de la batalo kaj de la sufero de la eŭropaj popoloj [...] Gurso, koncentrejo, vokas al singardo, al unueco, al agado por ke homoj povu vivi libere kaj digne.*»

De tiam okazas en Gurso rememoriga manifestacio, kiun partoprenas judaj organizoj, delegitoj el Badenio, eksaj malliberuloj aŭ iliaj familioj, kaj diversnaciaj homoj, kiuj esprimas per sia ĉeesto la deziron, ke ĉi tiuj krimoj neniam forgesiĝu.

## Nuna stato

En la koncentrejo rekonstruita triangulo el lignotabuloj kovritaj per akvoŝirmita kartono rememorigas pri la centoj da samtipaj tegmentoj kiuj ŝirmis la tieajn malliberulojn.

**Kompil-tradukis el franclingva vikipedio Bernard Cornevin, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino kaj Vinko Markovo**

# *Libro vivas pli longe ol unu sezono...*

*Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara-kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.*




**Kio pri Paŭo?** Certe Paŭloj vivas en tiu bela urbo... Sed mi dubas ĉu oni tie povas vidi paŭlinion aŭ paŭlovnion? Kaj pri (esperantaj) libroj, granda paŭ... perismo! Tamen, tamen en **Monumente pri Esperanto –** Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj – (UEA, 1997, 111 paĝoj, 8,40 €... sed ne en la katalogo 2008 de la Libroservo de SAT-Amikaro! Do eble en 2009?!!), oni povas vidi grandan foton de Zamenhof-monumento en Paŭo, kun teksto en la franca kaj en Esperanto: «Kiam la popoloj povos libere sin kompreni, tiam ili ĉesos reciproke sin malami.». Tiu monumento estis inaŭgurita en 1987. Vi ankaŭ ekscios, ke en 1983 estis inaŭgurita Zamenhof-skvaro kaj en 1990 Esperanto-Arbo. Tri ZEOj en unu urbo, gratulon!

Alia fenomeno estas ligita al Paŭo: Marie-Thérèse Lloancy. Tiu ĉi staĥanovistino, prezentis laboron por la Lingvistika Doktoreco, en Sorbono en la jaroj 1984/1985. Kial staĥanovistino? Ĉar ŝia disertaĵo: «Espéranto et jeu de mots dans l'oeuvre de Raymond Schwartz (1894-1973)» (Esperanto kaj vortludoj en la verkaro de Rajmondo Ŝvarco) plenigas 1200 paĝojn! La tuto estas legebla en tri volumoj, kiujn Marie-Thérèse Lloancy mem eldonis. En la tria volumo ŝi konkludas per frazo de Schwartz – el artikolo de Sennacieca Revuo: «Estas saĝe, ĝustatempe enterigi, kion oni ne povas... eternigi.» Ĉu restas aĉeteblaj ekzempleroj? Mi ne scias, sed eble vi povos rekte kontakti la aŭtorinon okaze de nia kongreso.

**Ĵak Le Puil**

# Esperanto kaj hispanaj rifuĝintoj dum la intercivitana milito

**Dum la kongreso Robert Lloancy prelegos pri tiu temo**

La celo de tiu prelego ne estas pritrakti la hispanan militon en si mem kaj en sia tuto, malgraŭ la granda intereso de tia temo. Pli ĝuste kaj pli modeste la celo estas rilatigi tiun militon kun Esperanto. Tiel mi esperas prilumi du aspektojn: unue trakti temon ne tre konatan eĉ de multaj esperantistoj, due surtabligi faktojn ofte ignoratajn de la grandaj specialistoj, kiuj studis tiun militon. Cetere, la fokuso de mia intereso koncernas, pli precize, la eventojn de la tiel nomata «Retirada», kio, en Esperanto estas la Retiriĝo aŭ Retreto. La prelego konsistas el tri grandaj partoj.




a) **La unua parto prezentas la historian kuntekston**, kiu kondukis al malpaco. Oni tie skizas la rolon de la diversaj aktoroj de tiu milito. Ĝi estis milito interna aŭ intercivitana. Ĉefe estis du grandaj grupoj interbatalantaj: la respublikanoj kaj la naciistoj. Tamen la afero iĝas iom pli komplika pro la fakto ke, sur ambaŭ flankoj, aperas helpantoj venantaj el multaj aliaj landoj. La hispana milito havis do veran karakteron internacian, preludo al la monda milito baldaŭ eksplodonta.

**b) La dua parto temas pri la «Retreto»,** ekde februaro 1939, pri ĝiaj kaŭzoj kaj ĝiaj sekvoj. Tie oni pritraktas la malfacilan vivon, en la koncentrejoj, de pluraj miloj da homoj ekzilitaj kaj dismetitaj en diversajn lokojn de la suda Francio.

**c) La tria parto priskribas la rolon de Esperanto**, unue fare de la oficiala registaro de Katalunio mem; due ĝi montras la helpon, kiun alportis la diversaj Esperanto-organizaĵoj, ĉefe S.A.T.; trie ĝi taksas la disvolviĝon de Esperanto en la koncentrejoj mem.

**Robert Lloancy**

# Gustumado de Ĵuransona vino

**Grundo de tradicio, grundo de bonegeco, la vitejo de *Bellauc*, («Bela Loko» en la bearna) famegis antaŭ longe. Ĝia loko, komence de la krestlinio de *Cuqueron* parte klarigas tion: la grundoj el silica gruzo kun ferhava krusto plej bone rivelas la fajnecon de la «*Petit Manseng*» kaj ties kapablon oldiĝi.**



En 1964, pro manko de emo daŭrigi la familian produktadon, oni forlasis la vitojn. *Bellauc* forgesiĝis...

En 1997, *Gil Schefchen* kaj *Marie-Blanche Laouénan* malkovris la grundon tiom deziratan, kaj cedis al la ĉarmo de *Bellauc*. Ili decidis redoni ĝian famon al tiu loko, ŝmirita de la fuŝaĵoj de iu moderna vitkultivado. Sur la deklivoj, vidalvide de Pireneoj, ili priplantis du hektarojn per la «reĝa» loka vitvario : la «*Petit Manseng*».

Ĉi tie, ĉio celas kvaliton kaj koherecon: denseco kaj palisalteco optimumaj, tondado «*Guyot*» simpla, ekokultivo garantiita.

La vitflegadoj nombras kaj diversas por konsistigi efikan preventon al la malsanoj. Konformigado al la naturo, efektivigo de la taskoj en rilato kun la ĉefaj naturaj ritmoj trudiĝas.

La ekologia kaj sanitara zorgado, la klopodo minimume uzi aldonaĵojn, respekto de la naturo kaj de la scio de la prauloj, pravigas la rajton uzi la vortojn «grundo» kaj «tipeco», vortoj ofte misuzataj.

Dum vinberrikolto, pluraj specigoj okazas. La grapolojn, kolektitajn en korbojn per branĉtondileto, poste aranĝitajn en aĵuraj skatoletoj, oni tuj kunportas al la proksima vinejo, por malebligi varmiĝon, premiĝon kaj oksidiĝon.

*Gil* kaj *Marie-Blanche* ĉeestos la kongreson, kaj gvidos gustumad-atelieron, dum kiu ili prezentos siajn laborojn kaj produktojn.

# Utilaj informoj

**Sidejo: dejôr-horoj**

| | |
|---|---|
| Lunde | 18h30 - 19h30 |
| Marde | 10h00 - 16h00 |
| Merkrede | 14h30 - 18h30 |
| ĵaŭde | 15h30 - 18h30 |
| Vendrede | 09h30 - 19h30 |
| Sabate | 11h00 - 18h00 |

**KURSOJ**

■ **Unua grada**
**lundi** 17H30 kun Georges Meilhac
**mer.** 14H30 kun Hélène Bonjour.

■ **Parolaj perfektigaj kursoj ĉe la sidejo**
**ĉiun merkredon**, je la 16a, kun Thérèse Pinet **ĉiun jaŭdon** je la 16a, kun Élisabeth Barbay. La preparo al la kapableco okazas **vendrede** je la 18a kun Vinko Markov, **sabate** je la 14a kun Vincent Charlot.
La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas **ĉiun unuan merkredon** de la monato, je la 17a kaj duono, kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:**
Claude Gerlat
38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €. ) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.
**Pedagogio:** Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

**Kotizoj 2008 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€**

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

**Abono 2008 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.**

**Por pagi:**

■ **En Francio**: SAT-Amikaro
CCP: 37 852 90 L La Source.
Nº IBAN, (por pagi el fremda lando):
SAT-AMIKARO.
FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314
BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** SAT-Amikara Grupo;
konto nº 001-4825107-15
(ĉe Clémentine Staquet).

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :
Poŝta konto nº 23-14908-9.

**Kiu faras Kion?**
Directeur de la publication: Guy Cavalier.
Ĉefredaktanto : Vinko Markov.
Enpaĝigisto : Frederic Scibor, por ĉi numero.
Korektskipo : André Andrieu, Ĵak LePuil, Vinko Markov, Serĝo Sir'
Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino, Jean-Claude Thumerelle

**KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:**

■ Prefere per reto, al **lasago@aliceadsl.fr**, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formato por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formato.

■ Eventuale sur papero, tekstoj ***prefere*** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitajn kontribuaĵojn, publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de la artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

**ADRESARO**

**La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,**
**La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.**
**Sidejo de SAT-Amikaro:** 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02
TTT-ejo : http://www.esperanto-sat.info
Retpoŝt-adreso: *sat-amikaro@wanadoo.fr*

**Claude Gerlat** 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71
Retpoŝt-adreso : claude.gerlat@orange.fr
**Mireille Grosjean :** Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets
**Clémentine Staquet** (Espéranto-Infor) 14 rue du Loutrier BE-1170 Bruxelles
**Serge Sire** (Serĝo Sir)
85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Retpoŝt-adreso : lasago@aliceadsl.fr

**SAT: Abono al "Sennaciulo" 2009: 57 €**

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly
p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.


■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen
p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

# 59-Kiel traduki «poule» .

La vorto ***poule*** nomas la inon de la korta birdo koko, kiu apartenas al la ordo de galinoformaj birdoj aŭ kokobirdoj, kiel fazano, koturno, meleagro, pavo, perdriko, ktp; do en sia propra senco ĝi tradukiĝas per **kokino.** Sed tiu sama vorto estas ofte uzata en figura senco por nomi, jen femalon de alia kokobirdo, jen virinon, ktp; ĝi estas uzata ankaŭ en kunmetaĵoj; tiam ĝi komprenebIe postulas aliajn tradukojn.

| | |
|---|---|
| La poule picore du grain. | **La kokino pikplukas grenon.** |
| La poule glousse pour appeller ses petits. | **La kokino klukas por voki siajn idojn.** |
| La poule caquète en venant de pondre. | **La kokino blekas tuj post ovumo.** |
| Une poule pondeuse. | **Ovumanta kokino.** |
| Une poule couveuse. | **Kovanta kokino.** |
| Une poule au riz. | **Kokinaĵo kun rizo.** |
| La poule farcie est un plat traditionnel. | **Farĉita kokinaĵo estas tradicia plado.** |
| Henri IV désirait que chaque paysan puisse mettre une poule au pot. | **Henriko la 4a deziris, ke ĉiu kampulo povu enpotigi kokinaĵon.** |
| Quand les poules auront des dents. | **Kiam la kokinoj ricevos dentojn; neniam.** |
| Plumer la poule sans la faire crier. | **Senplumigi kokinon, ne vekante mastrinon.** |
| Tuer la poule aux œufs d'or. | **Manĝi kokinon, kiu demetus orajn ovojn.** |
| On peut avoir la chair de poule de froid ou de peur. | **Oni povas ricevi anserhaŭton pro malvarmo aŭ pro timo.** |
| Se coucher comme les poules. | **Tre frue enlitiĝi.** |
| Une mère poule. | **Trozorgema patrino; kovema patrino.** |
| C'est une poule mouillée. | **Li estas malkuraĝulo.** |
| La poule faisane est la femelle du faisan. | **Fazanino estas la ino de fazano.** |
| On appelle poule d'eau le genre *gallinula*, de la famille des Rallidés. | **Nomiĝas akvokoko aŭ marĉokoko la galinolo el la familio Raledoj.** |
| La poule des bois ou gélinotte appartient à la famille des Tétraonidés. | **Bonazio apartenas al la familio Tetraonedoj.** |
| La poule sultane appartient au genre *porphyrio* et à la famille des Rallidés. | **Sultankoko estas Porfirio el la familio Raledoj.** |
| La poule des neiges ou lagopède est un gallinacé de la famille des Tétraonidés. | **Lagopo estas kokobirdo, el la familio Tetraonedoj.** |
| La dorée ou poule de mer ou saint-pierre est un poisson de la Méditerranée. | **Zeŭso aŭ fiŝo de Sankta Petro estas fiŝo el Mediteraneo.** |

# LIBROSERVO




— Novaĵo —

**Pro kio?** (Internacia krim-romano originale verkita de Friedrich Ellersiek «*ARGUS*») - 8€
*eld. Mondial - 156 paĝoj; grando: 8» x 5» (20,3 cm x 12,7 cm)*

En 1920 la germana eldonejo Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek publikigis la krim-romanon *Pro kio?* – de aŭtoro kun la pseŭdonimo Argus, kiu poste montriĝis la posedanto de la eldonejo, Friedrich Wilhelm Ellersiek (1880-1959). Malgraŭ ĵurnalisma sperto, i.a. kiel redaktoro de Germana Esperantisto (1910-1914), li verkis nur unu romanon: tiun ĉi romanon pri krimo. La unua krim-romano en la historio de la originala Esperanto-literaturo, unue publikigita en 1920, kaj nun lingve iomete prilaborita por nia eldono de 2008. Fascina historio pri murdo kaj amrilato...

**Sat-Amikaro libroservo**
132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Telefono : 01 44 24 50 48
(Vendrede 9H30-17H; Sabate 11H-18H)
Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G




**Sendkostoj**
**Al ĉiu mendo aldonu:**
40 % ĝis 5 €
35 % ĝis 10 €
25 % ĝis 20 €
20 % ekde 20 €

| | |
|---|---|
| Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj | 7,00 |
| Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla | 7,00 |
| Espéranto Éclair (Raymon Gueguen) | 4,00 |
| Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché | 10,00 |
| Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat) | 6,00 |

| | |
|---|---|
| Communication linguistique (Claude Piron) | 5,00 |
| Une humanité, une langue (Simone Glodeau) | 2,30 |
| La langue internationale (Raymond Gueguen) | 8,00 |

| | |
|---|---|
| Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita | 23,00 |
| Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 140 x 200, 130 paĝoj | 4,30 |
| Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita. | 23,00 |
| Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita | 80,00 |

| | |
|---|---|
| Il appelle sa fille «ma poule». | **Li nomas sian filinon «karulino».** |
| Il connait toutes les poules de son quartier. | **Li konas ĉiujn amoristinojn de sia kvartalo.** |
| Le «vert galant» ne manquait aucune occasion de mettre une poule dans son lit. | **La «verda galantulo» ne maltrafis ian okazon por enlitigi amorantinon.** |
| Ne le dérangez pas, il est avec sa poule. | **Ne entrudiĝu, li estas kun sia amorantino.** |
| Au poker il a levé une poule de 1000 euros. | **Ĉe pokero li gajnis 1000-eŭran vetaĵon.** |
| Ces deux équipes font partie de la même poule du championnat. | **Tiuj du teamoj apartenas al la sama grupo de la sportkonkurso.** |
| Une bouche en cul-de-poule. | **Ronde paŭtanta buŝo.** |
| Le cul-de-poule d'une espagnolette est un renflement à la hauteur de la poignée. | **La tubero de espanjoleto estas ŝvelaĵo ĉe la mantenilo.** |
| Un cul-de-poule est une bassine demi-sphérique servant par exemple à monter les blancs d'œufs en neige. | **Kirlujo estas duonsfera vazo servanta ekzemple por kirli ovoblankojn al ŝaŭmo.** |

Andreo Andrio




*59-Kiel traduki «poule»*

# Unuaj paŝoj en Gaskona lingvo

**Dum la kongreso Jomo proponos inicadon al la Gaskona Lingvo.**

**Li prelegos ankaŭ pri «*La Okcitana muziko*»**

**La gaskona lingvo estas la plej okcidenta formo de la okcitana lingvo. Ĝi malsamas de la aliaj variantoj per kelkaj specialaĵoj, kiuj venas pli malpli de la praeŭska lingvo parolita de la Akvitanoj en pli-malpli la triangulo : Pireneoj, Oceano, rivero Garono. La plej specifaj estas (la ekzemploj estas komparoj inter latina kaj gaskona):**

1/ F je la komenco de la vorto iĝas H (filium = hilh, femina = hemna, buffare = bohar). Eŭske oni anstataŭas per B aŭ P (festum = pest).
2/ R je la komenco de la vorto iĝas ARR (ratum = arrat, rivum = arriu) kiel eŭske.
3/ N je la mezo de la vorto malaperas, kiel portugale (luna = lua, gallina = garia).
4/ la LL de la latina iĝas TH fine de la vorto (castellum = castèth, vitellum = vetèth)
5/ la LL de la latina iĝas R meze de la vorto (bella = bèra, bollire = borir)
6/ la litergrupo MB iĝas M (cambam = cama, palumbam = paloma)
7/ la litergrupo ND iĝas N (fundere = hóner, tundere = tóner)
8/ R iras antaŭen (cameram = cramba, paupere = praube)
9/ la litergrupo TR iĝas T (nostrum = nòste)
10/ uzo de partikuloj que, be, e antaŭ la verbo.
La kvanto de tiuj specifaĵoj plias kiam vi iras sudoksidenton kaj malproksimiĝas de langvedoka regiono.

**Saluti estas ege simple**.
Por diri «*Saluton*» aŭ «*Bonan tagon*», aŭ «*Bonan matenon, vesperon*», ktp kaj eĉ «*Ĝis revido*» unu vorto sufiĉas :
*Adiu* (adiŭ) al unu persono
*Adishatz* (adiŝac) al pluraj
Kaj poste vi povas komenci babili per la tradicia :
*Va plan ?* (ba pla) kiu signifas : *Kiel vi fartas ?* laŭvorte «*ĉu iras bone*» ?
Tiukaze, la respondo ankaŭ simplas :
*Va plan*. (ba pla), kiu signifas «*Bone*», laŭvorte «*iras bone*» se vi sanas.
*Pas tròp*. (pas trop), «*ne tro*» se mankas al vi energio.

**Por demandi la nomon de iu**, ne hezitu uzi :
*Quin t'apèras ?* (kin taperos) "kiel vi nomiĝas", kiu necesigas la respondon :
*Que m'apèri* ... (ke maperi), "mi nomiĝas"
La vorteto "*que*" antaŭ la verbo ne nepras, sed ĝi estas la "subskribo" de la gaskona kaj donas al la frazo la plej bonsonan gaskonecon.
Por demandoj oni uzos « e » kaj por ekkrio « be ».

La verbo « esti » havas tiujn formojn:
Que soi, qu'ès, qu'ei, qu'èm, qu'ètz, que son (ke suj, kes, kej, kem, kec, ke su)

**Al kiu oni povas aldoni :**
*Gran, chicòi, petit, beròi, colhon, agradiu, brave, malaut* (gran, ĉikoj, petit, beroj, kuju, agradiŭ, brabe, malaŭt) Granda, eta, eta, bela, stulta, agrabla, afabla, malsana.
Kaj la verbo « havi » :
*Qu'èi, qu'as, qu'a, qu'am, qu'atz, qu'an* (kej, kas, ka, kam, kac, kan)

**Al kiu oni povas aldoni :**
Un ostau, un can, ua bicicleta, un hrair, ua sòr, tribalh de hèr, arren tà minjar. (ünustaŭ, ü ka, üo bisikleto, ü raj, üo so, tribaj de he, arre ta minĝa) Domon, hundon, biciklon, fraton, fratinon, laboro por fari, nenion por manĝi.

**Jen nun tipa proverbo de Gaskonio**
*Que's cau mauhidar d'un shibau per darrèr, d'ua hemna per davant e d'un curat de tot costat.* (kes kaŭ maŭhida dü ŝibaŭ per darre, düo henno per daban e dün kürat de tut kustat) Oni devas malfidi ĉevalon malantaŭe, virinon antaŭe kaj preĝiston je ĉiuj flankoj.

**Jomo**

## La okcitana muziko

La okcitana muziko, tutsame kiel la okcitana kulturo, enigas siajn radikojn en diversaj lokoj de Eŭropo. El la balta maro kaj enfluejo de Vistulo ĝis islama ibera duoninsulo tra orienta Eŭropo, la Balkanoj kaj Italio, ĝi estas la heredinto de la tradicioj de la visigota popolo. Dum mezepoko, per la verkoj de la trobadoroj, ĝi radiis sur la tuta kontinento, kunportante la moralajn valorojn de arto, de toleremo, de kritiko al povplenuloj kaj respekto al ineco. La fadeno de okcitana verkado neniam malfortiĝis dum jarcentoj, kaj eĉ nuntempe ankoraŭ pli riĉas.





Jomo (Jean-Marc Leclerc) verkis «Le Gascon de Poche

# Plano B 3.0

**Dum la kongreso Robin Beteau prelegos pri «*Plano B*»**

**SAT-Eldona Fako Kooperativa ĝis nun eldonis plurajn klerigajn verkojn. Komence, aperis «Mortopuno» kaj lastatempe «La Pariza Komunumo» kaj «La itala socialismo kaj Esperanto». Nun, referenc-verko estas pretiĝanta, eldoniĝos februare 2009 kaj estos prezentita dum nia Kongreso en Paŭo: «Plano B 3.0».**

«Plano B 3.0» estas verkita de Lester Russel BROWN [braŭn], fondinto de du institutoj: World Watch Institute (Instituto por Tutmonda Observo), kiu celas tutmonde kolekti naturmediajn, socialajn, politikajn, demografiajn, ekonomiajn, ktp informojn, starigi analizojn kaj proponi strategiojn por ebligi kreon de tutmonda, naturmedie daŭripova socio respondanta la bezonojn de la homaro, kaj World Policy Institute (Ter-Politika Instituto), kies celo estas proponi rimedojn por pripensado kaj agado por respondi per kooperaj politikoj la kompleksajn defiojn kiujn frontas la homaro.




«Plano B 3.0» estas la tria kaj lasta aktualigo de origina anglalingva verko «Plan B». «Plano B 3.0» fundamente celas unuaŝtupe efikan klerigon pri la naturmediaj problemoj kaj duaŝtupe honeste informi pri rimedoj por redukti la premon kiun pezigas la homara vivo sur la naturmedion. «Plano B 3.0» havas subtitolon «Mobilizo por savi civilizacion» kiu spegulas la spiriton de la verko: la situacio estas tiel danĝera ke endas nun streĉi ĉiujn strebojn por antaŭmalhelpi ĝeneralan naturmedian katastrofon. Kaj tio devas fariĝi je sama rapido kaj efikeco kiel pormilita mobilizo. Efektive, Lester R. Brown konstatas ke pli kaj pli da ŝtatoj ne plu povas funkcii ĉar ili estas elsuĉitaj de la regantoj aŭ premataj de problemoj (demografia multiĝo, resurs-elĉerpiĝo, mizeriĝo de la loĝantaro, nekapablo de loka agrikulturo nutri loĝantaron pro militoj, sekegecoj aŭ inundoj, ktp.) kiujn ili ne kapablas solvi. Sekve la loĝantaro malfidas je la ŝtato kaj tiam ekregas la koncernajn landojn mafioj aŭ militgrupoj. Tiaj multiĝantaj situacioj igas plenumadon de demografia planado, protekton kaj daŭripovan uzon de resursoj kaj resurs-mastruman tutmondan politikon neeblaj. La tutmonda situacio pli kaj pli rapide atingas kritan punkton, ĉe kiu ne plu eblos ion ajn fari por savi homaran elteneblan ekziston sur la Tero. Antaŭ tia katastrofa kaj alarmiga konstato, «la defio de nia generacio estas konstrui novan ekonomion - kiu estos grand-parte efektivigita per renovigeblaj energi-fontoj, posedos altgrade diversigitan transport-sistemon kaj ĉion reuzados kaj reciklados. (...) Daŭrigi laŭ la nuna maniero (Plano A), detruante la natur-mediajn bazojn de la ekonomio kaj starigante la cirkonstancojn por danĝera klimat-ŝanĝiĝo, ne plu estas daŭripova elekteblo. Jam estas tempo de Plano B.»

«Plano B 3.0» starigas kvar ĉefajn celojn: «stabiligi klimaton, stabiligi loĝantar-nombron, elimini mizeron kaj revigligi la Terajn ekosistemojn». Por plenumi tiun planon, Lester R. Brown informas pri la rimedoj kiujn jam nun la homaro disponas. Jen la ĉefaj agoj plenumendaj: - Elimini mizeron kaj stabiligi loĝantar-nombron per universala baza eduko, efika san-sistemo kaj redukto de subvencioj al agrikulturo kaj ŝuldoj. - Restaŭri la Teron, per protekto kaj restaŭro de arbaroj, grundoj kaj fiŝkaptejoj, ankaŭ per protekto de tutmonda faŭno kaj flaŭro kaj fine per plantado de arbaroj por reteni aeran karbonon. - Nutri ok miliardojn da homoj per nova difino de tera produktiveco, por igi pli efikaj akvo-uzadon kaj produktadon de proteinoj kaj ankaŭ per malsupreniĝo de la homaro en la nutraĵĉeno (t.e. nutrado pli vegetarana). - Desegni urbojn por homoj per reorganizo de transport-sistemoj, redukto de akvo-uzado, alproksimigo de agrikulturo al urboj per enurba kultivado, ktp... - Plialtigi energiefikecon per malpermeso de inkandeskaj lampoj, uzo de energi-efikaj aparatoj, starigo de energi-ŝparaj kaj -produktaj konstruaĵoj kaj restrukturado de transport-sistemoj. - Turniĝi al renovigebla energio: utiligi ventan, sunan kaj teran energion.

Ĉi tiu verko estas do mondskaleca, ĉerpante siajn informojn el la tuta mondo kaj proponante tutmondan perspektivon pri la situacio kaj rimedoj uzindaj. Ĝi ne nur liveras bonegan ilaron por ĉerpi el ĝi ideojn kaj ag-eblecojn aplikeblajn ĉe loka skalo, ekzemple, sed ankaŭ formas interesan inspir-fonton por niaj pripensoj kaj agoj.

«Plano B 3.0» estas kleriga: la lingvaĵo estas facile komprenebla kaj la verko sinteze prezentas kompletan informaron, kio ebligas sintezan kaj tutecan komprenon de la problemaro kaj ties solvoj.

La eldonanta Ter-Politika Instituto celas diskonigi la enhavon de la verko: anglalingva originalo estas senpage elŝutebla per la ret-paĝaro de la Instituto. La esperant-lingva traduko estas do unua plia paŝo al diskonigo de ĉi tiu grava informilo. Traduko de ĉi tiu verko estis plenumita de tutmonda skipo el ĝis nun naŭ homoj: Michael Cayley, Charmian, Leo De Cooman, Jack Warren, Nicola Ruggiero, David Kelso, Giridhar RAO, Klaŭdo Roux kaj mi.

**Robin Beto**

# Bankedo de la senkreduloj

## Mi estas feliĉa liberpensulo

Fakte mi estas ankaŭ esperantisto, adepto de Bankedo de la Laŭdire Sankta Vendredo (Vidu la numeron 44 de La Sago), kiu nomiĝas, en nia bela urbo Paŭo, *«Bankedo de la senkreduloj»* Mi ĵus eksciis ke la SAT-amikara kongreso okazos en Paŭo de la 11a ĝis la 13 de aprilo, do la antaŭan tagon, eblos bankedi en la sama urbo, kaj mi esperas ke miaj esperantistaj amikoj kiuj samideas pri nekredo, amase enskribiĝos, ke okazos belega bankedo kaj ke naskiĝos ligiloj inter anoj de SAT-amikaro kaj de Liberpenso. La 11an de novembro, ĉ 500 homoj kuniĝis antaŭ la pacista monumento de Gentioux (Vidu la numeron 48 de La Sago). Ĉeestis reprezentantoj de la Liberpenso, de la Ligo por la Homaj Rajtoj, de la Franca Pacista Unio, kaj kvardeko da esperantistoj. Tiuj asocioj, kaj multaj aliaj havantaj sidejon en Paŭo, ĉiuj povos havi reprezentantojn, por manĝi, kanti, kune tosti, vendredon la 14an de aprilo 2009, jubileante la 141an datrevenon de la unua bankedo (1868) kontraŭ la religiaj malpermesoj de Sainte-Beuve, Renan, Flaubert kaj aliaj. SAT-amikarajn kongresanojn oni invitas do ekde vendredo vespere. La manĝotarifon ni indikos baldaŭ. Tranoktado ne eblos en la liceo, sed la OKK helpos vin trovi tranoktadejon ĉe la loĝantoj aŭ ĉe hoteloj.

**Henri Graven**

# Tuttaga Ekskurso : eŭska lando

**Mardo la 14a de aprilo, vizito al la Kastelo de Abadio, de la Eŭska kornico kaj de la vilaĝeto Espelette. Ni ankaŭ tagmanĝos tradicie en restoracio.**

## La kastelo de Abadio

La kastelo de Abadio (Abbadie) staras en Handajo (Handaye) en la franca departemento «Atlantika Pireneo», sur la Eŭska Kornico. Tiun kastelon kontruigis Antono de Abadio de Arasto (Antoine d'Abbadio d'Arrast) por sia propra uzo, laŭ planoj de Violeto la Duko (Viollet le Duc), en stilo nov-gotika, kun iom da orientalismo.



Ĝi konsistas el tri partoj: la loĝejo, kun tipaj dekoroj kaj mebloj de grandburĝulo fine de la 19a jarcento; la kapelo kaj la specialaĵo de ĉi kastelo, nome astronomia observatorio, kun ampleksa biblioteko.

Tiun kastelon-observatorion, Antono de Abadio heredigis en 1895 al la Franca Scienca Akademio, kiu ankoraŭ nun posedas ĝin. La bieno, sur kiu staras la kastelo, 250 ha-granda, iĝis publika kaj ĝin administras la Handaja municipo.



### *Antono de Abadio de Arasto*

Antono de Abadio naskiĝis en Dublino (1810) de irlanda patrino kaj de eŭska patro, studis en Sorbono en diversaj fakoj (scienco, juro, lingvistiko). Poste, li studis ĉe la Nacia Naturscienca Muzeo kaj ĉe la Franca Kolegio. En 1836, li aliĝis al scienca misio en Brazilo, organizata de la Franca Scienca Akademio celante studi pri « la taga variado de la magneta kliniĝo en proksimeco de la ekvatoro»

Tuj post sia reveno, li organizis duan vojaĝon, al Abisenio (nun Etiopio) kie li restis dek jarojn, dum kiuj li plenigis kvar celojn: serĉi la fonton de l' Nilo, serĉi pliajn elementojn rilate la devenojn de la nigrula loĝantaro, pliproksimigi la landon de la katolika roma eklezio, pligrandigi la influon de Francio en tiu afrika regiono.

Surloke, li studis etiopiajn lingvojn, el kio, li verkis amharan vortaron (la tria mondskale pri tiu temo, kiu ampleksas je ĉ. 15000 vortoj). Li ankaŭ publikigis diversajn raportojn, por kiuj li ricevis oran medalon de la Geografia Societo kaj de la ŝtato, la Honoran Legion.

Li plu science vojaĝis, plu studante la teran magnetismon, la sunajn eklipsojn.

En Handajo, kies urbestro li fariĝis de 1871 ĝis 1875, li konstruigis observatorion ekde 1858, kaj en 1859, li edziĝis kun Virĝinio Vincento de San-Boneto (Virginie Vincent de Saint-Bonnet), kio markas la finon de lia vojaĝema vivo.

Dum tiu sama periodo, notindas ankaŭ eŭska aktivado, nome en 1835 eldono de gramatika studo pri la eŭska lingvo kun Aŭgustin' Ŝaho (Augustin Chaho), post kio, li lanĉis la eŭskajn festojn en Urujno (Urrugne - 1851).

Komencita en 1860, la neogotika kastelo staris en 1864 apud la observatorio, kiun en 1876 oni rekonstruis en stilo pli kongrua al tiu de la kastelo. Antono de Abadio provizis sian observatorion per avangarda ilaro: meridiana lorno, horloĝoj ktp decimale gradigitaj (anguloj en gradusoj, horoj de 100 «minutoj»...). Antono de Abadio mortis en Parizo en 1897.

## Espeleto

Proksime de la Eŭska marbordo, volvita en la vegetaĵoj kaj alpremita ĉe la bazo de la Mondarrain, Espeleto (franclingve: *Espelette*), vilaĝeto de apenaŭ 2000 loĝantoj, ne malgrave kontribuas al la eŭska ĉarmo. Ĉarmas ja la urbeto: stratoj borderitaj de blankaj domoj, flore ornamitaj, kun verdaj aŭ ruĝaj lignotegaĵoj, kaj tajlitaj ŝtonoj. Tiu harmonia kadro ĝin elektigis «plej pimpa franca vilaĝo» en 1922, kaj ĝi ricevis en 1955 la diplomon «Prestiĝo de Francio».

Okaze de la vizito en Espeleto vi malkovros certe kelkajn belegajn spurojn de ĝia riĉa historio, kiel la feŭdan kastelon kaj la samepokan preĝejon, sed ĉefe la lokan gastronomion, centrigitan ĉirkaŭ la fama «kapsiko de Espeleto»



Devenanta de Sud-Ameriko, ĝi eniris Eŭskion en la 16a aŭ 17a jarcento. Unue uzita kiel kuracilo, ĝi rapide iĝis spicaĵo kaj konservilo por viandoj, ĉefe ŝinkoj. En 1650, oni ekplantis kapsikon en Espeleto mem. Oni selektis grajnojn, kiuj naskis la varion «Gorria» (eŭske: ruĝa) kiu iĝis la «kapsiko de Espeleto»

De tiam, ekde septembro la vilaĝaj domoj pitoreske sin vestas de sekiĝantaj kapsikfruktoj, grapole ŝnuritaj, pendantaj ĉe la fasadoj kaj la balkonoj. Ne maloftas ankaŭ restoracioj kaj trinkejoj, kies plafonoj malaperas super la dika tavolo de tiaj grapoloj...

Festo de la Kapsiko okazas ĉiujare en Espeleto, la lastan semajnfinon de oktobro. Ĝi kutime venigas pli ol 20000 vizitantojn, dekoble pli ol la loka loĝantaro... La Kapsiko de Espeleto havas la kvalitomarkon AOC ekde la jaro 2000, AOP ekde 2002, sub la protektataj nomoj «piment d'Espelette» aŭ «piment d'Espelette - Ezpeletako biperra».

La «ardeco» de la espeleta kapsiko egalas pli malpli tiun de la pipro, sed ĝi odore pli riĉas, pro ĝia longtempa subsuna sekiĝo. Ĝi anstataŭas pipron en la tuta eŭska kuirtradicio jam de kvin jarcentoj. Ĝi utilas por reliefigi pladojn inter kiuj troviĝas «piperado», «Aŝoa» (eŭske «Axoa» = bovidaĵa raguo), «eŭska kokidaĵo», ŝinkoj, pastaĵoj, kaj multaj aliaj.

Ĝin oni povas aĉeti sub formo de kaĉo, en olivoleo, en vinagro, en ĵeleo -frande uzata kun grashepataĵo por toastoj - aŭ kiel bazo de subtile elloboritaj saŭsoj. Multnombras la produktoj en kiuj troviĝas espeleta kapsiko: salo, grashepataĵo, ĉokolado, mustardo, kaj eĉ vino.

# Tuttaga Ekskurso : *Gurs* kaj *Monein*


Tiu ekskurso konsistas el du partoj.

1°) La unua temas pri memordevo koncerne la hispanajn ekzilitojn, kiuj trovis savon, malgraŭ la tre malbonaj vivkondiĉoj en la koncentrejo de *GURS* (Vidu apartan historian priskribon pri ĝi). Ni tie sekvos la doloran vojon, kiun unue spertis multaj rifuĝintoj post la fino de la hispana milito. La Amikaro de la eksdeportitoj aranĝis tie, kun pedagogia celo al la nunaj generacioj de geknaboj, ekspozicion de entute trideko da paneloj kun tre trafaj pritraktoj. Oni ankaŭ rekonstruis, laŭ originalaj dimensioj, barakon por doni la ĝustan pritakson de la tiama vivmaniero en tiu loko. (daŭro de la vizito: 1h 30)



2°) Vizito, en la urbo *MONEIN*, de la preĝeja ĉarpentaĵo, kun vera spektaklo de lumoj diverskoloraj, inspiraj muzikoj kaj paroloj por priskribi la kolosan laboron. La dimensioj trafe bildigas la monumentecon de tiu konstruaĵo de la gotikaj tempoj. La trabaro de tiu ĉarpentaĵo estas 50 m longa, 21 m larĝa kaj 18 m alta. Oni pripensu la laboron postulatan, la tempon bezonatan por la realigado, la nombron de laboristoj, kaj la precizecon de la gestoj. Ĉar, antaŭ ol kunigi la ĉarpentaĵon ĉe la kulmino de la preĝejo mem, oni unue muntis ĝin sur la grundo de la apuda placo, oni numerigis ĉiujn trabojn, ĉiujn elementojn, malmuntis la tuton kaj ĉion transportis supren. Krome, neniu najlo el metalo estis uzata. Laŭ la postuloj de la ĉarpento-arto oni uzis nur lignajn kojnojn aŭ kejlojn por kuntenigi la tuton. (daŭro de la vizito: 1h).

Krome, la aŭtobusa vojaĝo trakuras la



produkto-regionon de la vino «*Jurançon*». Survoje al *Gurs*, de Paŭo ĝis *Oloron*, ĉie la vitejoj estas videblaj ĉe la sunaj deklivoj de la montetoj. Survoje, ni trairos la urbeton *Jurançon*, al kiu ni ŝuldas la nomon de la vino mem. Ĉirkaŭ *Monein* oni trovas similajn vitejojn, kun vino laŭ tiu sama nomo. (daŭro de la veturado: 3h-3h30 entute).

*GRAVA ATENTIGO: Por atingi la ĉarpentaĵon, kie estas la sonluma spektaklo, necesas uzi turniĝantan helican ŝtuparon, en la sonorilturo, kun 72 ŝtupoj. Alia ebleco ne ekzistas.*

La tagmanĝo estos en restoracio de la urbo *Monein*.




**Au bord du Gave, par Sir' - Chronique de la vie de tous les jours à Annecy (et dans sa banlieue). Episode 49**
* Ça donne envie de louer un radeau... * Nous avons bien projeté une visite à Lourdes...
* Peut-être pourrions nous nous y rendre en radeau...* Il suffira de se laisser porter par le courant !...
* Excuse-moi, mais... * Lourdes est en amont ! * ... et sauf miracle, il nous faudra pagayer, et ferme, même !
* Comme toujours, quand il s'agit de faire un peu de sport, tu trouves un prétexte pour y échapper...

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224. ISSN: 1763-1319.
Directeur de la Publication : Guy Cavalier.
Dépot légal à parution
Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.